Sed kion pri la estonteco? Kompreneble nia unua tasko estas rekolekti la membrojn, reenfluigi la kotizojn kaj tiel certigi la regulan aperadon de SCIENCA REVUO. La estraro ankoraŭ diskutas, ĉu transsalti la jarkolektojn por 1979 kaj 1980 kaj kompense liveri al la membroj iujn aliajn publikigaĵojn kun rilato al scienco, aŭ ĉu aperigi iom reduktitajn jarkolektojn por tiuj du jaroj. Plie ekzistas planoj pri pretigo de varbiloj kaj de membrolisto aŭ jarlibro. La estraro ankaŭ diskutas pri okazigo de sciencistaj simpozioj kaj pri aperigo de sciencaj lernolibroj aŭ aliaj sciencaj verkoj en Esperanto.

Kiel vi vidas, taskoj abundas. Mi invitas ĉiujn esperantistajn sciencistojn al efika kunlaboro por realigi tiujn kaj aliajn planojn.

Kolege salutas vin

C. Støp-Bowitz
prezidanto de ISAE

Notoj de la ĉefredaktoro

Referencante al SR, 1978, 1, 8, mi denove petas, ke ĉiu aŭtoro, kiu deziros aperigi sian traktaĵon en SR, bonvolu atenti jenon:

1. Verki laŭeble pri sia propra originala esplorado tiel, ke ĝin komprenu eĉ alifakaj sciencistoj;
2. Sendi al mi la tekston en 2 ekzempleroj, tajpitaj sur maldika papero;
3. Maŝinskribi normallitere en la tajp-areo de 165 mm × 250 mm, kun la liniado 1½, t.e. kun 40 linioj surpaĝe;
4. Ĉiun vorton neesperantan substreki ondlinie (por la kursiva komposto), dum rektlinia substreko signifas komposton dikliteran;
5. En la teksto noti lokojn, kie troviĝu eventualaj figuroj;
6. Ne forgesi referenc-liston;
7. Aldoni koncizan resumon en sia gepatra lingvo.

Ĉar SR strebas al perfekta faklingvo, mi supozas, ke la verkontoj zorge trastudos koncernan materialon, ĝis nun aperintan en SR, kaj ke ili kunlaboros kun TC-ISAE.

Anticipe mi dankas pro pacienca kunlaboro.

Sincere via

J. Kavka

INTEL 8080 — priskribo kaj programado

Vortoj de la tradukinto

La sekvantaj paĝoj estas grandparte traduko de du ĉapitroj el la usona libreto *"Intel 8080 Microcomputer Systems User's Manual"*, eldonita en septembro 1975, pri kiu ne ekzistas kopirajtoj. La paĝoj konsistigas la ĉefan parton de enkonduko al la kompreno de funkciado kaj utiligo de la fama konata mikroprilaborilo *INTEL 8080*.

Mi laboras ankaŭ pri konekto al komputoraj retoj per la proceduro *X25*, precipe pri la franca, pakkomuta reto *TRANSPAC*.

Ĉiuj kritikoj kaj rimarkigoj estas bonvenaj. Bonvolu sendi ĉiujn poŝtaĵojn al la adreso de mia oficejo:

Christian Bertin, inĝeniero
C.C.E.T.T., departemento *RSI*
2, rue de la Mabilais, B.P. 1266
35013 *Rennes Cedex*, Francio

1. La funkcioj de komputoro

Tiu ĉapitro prezentas iujn bazajn komputajn konceptojn. Ĝi havigas foninformojn kaj difinojn, kiuj estos utilaj en la postaj ĉapitroj de la manlibro. Tiuj, kiuj jam familiariĝis pri komputoroj, povas preterlasi ĝin.

Tipa karaktra komputoro konsistas el:
— centra prilabora unuo (CPU),
— storo,
— enig/elig- (EN/EL) pordoj.

La storon oni utiligas por stori **instrukciojn**, koditajn partojn de informo, kiuj regas la aktivojn de CPU, kaj **datumojn**, la koditajn partojn de informo, kiuj estas prilaborataj de la CPU. **Programo** estas grupo da logike ligitaj instrukcioj, storita en la storo. CPU legas ĉiun instrukcion el la storo laŭ logike determinita sekvenco kaj uzas ĝin por startigi prilaborajn agojn. Se la programsekvenco estas kohera kaj logika, la efektivigo de la programo produktos kompreneblajn kaj utilajn rezultojn.

La storon oni utiligas ankaŭ por stori la datumojn manipulotajn same kiel la instrukciojn, kiuj regos tiun manipuladon. Oni devas organizi la programon tiel, ke CPU ne legu neinstrukcian vorton, kiam ĝi atendas instrukcion. CPU kapablas rapide atingi iun ajn datumon, storitan en la storo; sed ofte la storo ne estas sufiĉe vasta, por ke oni povu stori la tutan datumaron necesan por aparta laboro. Oni povas solvi la problemon provizante la komputoron per unu aŭ pliaj **enigpordoj**. CPU kapablas adresi tiujn pordojn kaj enirigi la tiean datumon. La aldono de enigpordoj ebligas al la komputoro ricevi informojn el eksteraj ekipaĵoj (trubendlegilo aŭ fleksebla disko) laŭ rapidoj kaj kvantoj.

Komputoro bezonas ankaŭ unu aŭ pliajn **eligpordojn**, kiuj ebligas al CPU transdoni la rezultojn de sia prilaboro al la ekstera mondo. La eligaĵo povas iri al vidigilo por uzo fare de homa funkciigisto, al periferia aparato, kiu produktas "firman kopiaĵon", ekz. al linipresilo, al periferia storaparato, kia estas supladiska ilo, aŭ la eligaĵo povas konsistigi prilaboro-regajn signalojn, kiuj regas la funkciadon de alia sistemo, ekz. de aŭtomata muntlinio. Same kiel enigpordojn, ankaŭ eligpordojn oni povas adresi. La kunaj enig- kaj eligpordoj ebligas komunikadon de la prilaborilo kun la ekstera mondo.

CPU unuigas la sistemon. Ĝi regas la funkciojn, efektivigatajn de la aliaj komponaĵoj. CPU devas kapabli legi instrukciojn el la storo, analizi iliajn duumajn enhavojn kaj efektivigi ilin. Ĝi devas kapabli ankaŭ adresi storon kaj enig/eligpordojn, kiam tio estas necesa por la efektivigo de la instrukcioj. Krome, CPU devus kapabli identigi kaj respondi iujn eksterajn regsignalojn, kiaj estas INTERROMP- kaj ATEND-petoj. La funkciaj unuoj en CPU, kiuj ebligas al ĝi efektivigi la funkciojn, estas priskribitaj ĉi-sube.

Tipa centra prilabora unuo (CPU) konsistas el la interligitaj funkciaj unuoj:

— registrumoj,
— aritmetika-logika unuo (ALU),
— regcikvitaro.

Registrumoj estas portempe storaj unuoj en CPU. Iuj registrumoj, kiaj estas la instrukcimontrilo kaj la instrukciregistrumo, havas specialan utilon. Aliaj registrumoj, ekz. la akumulatoro, estas por uzo multe pli ĝenerala.

1.1. Akumulatoro

La akumulatoro kutime enhavas unu el la operandoj manipulotaj de

ALU. Unu tipa instrukcio ordonas al ALU adicii enhavon de iu alia registrumo kun enhavo de la akumulatoro kaj stori la rezulton en la akumulatoron mem. Ĝenerale la akumulatoro estas kaj la fontregistrumo (operando) kaj la celregistrumo (rezulto).

CPU ofte inkludas nombron da pliaj ĝeneralcelaj registrumoj, kiuj povas utili por stori operandojn aŭ provizoran datumon. La havo de ĝeneralcelaj registrumoj forigas la neceson dudirekte movi provizorajn rezultojn inter la storo kaj la akumulatoro, tiel pligrandigante la prilaborajn rapidon kaj efikon.

1.2. Instrukcimontrilo (saltoj, subrutinoj kaj la stako)

La instrukciojn, kiuj konsistigas programon, oni storas en la sistemstoron. La centra prilaborilo adresas enhavon de la storo por determini la taŭgan agon. Tio signifas, ke la prilaboro devas koni la storeron, kiu enhavas la postan instrukcion.

Ĉiuj storeroj estas numeritaj por distingi unujn de la aliaj. La numero, kiu identigas storeron, estas nomata ĝia **adreso**.

La prilaborilo prizorgas registrumon, kiu enhavas la adreson de la posta programinstrukcio. Tiu registrumo estas nomata **instrukcimontrilo**. La prilaborilo aktualigas la instukcimontrilon aldonante "1" al la registrumo ĉiufoje, kiam ĝi legas instrukcion. Tiel la instrukcimontrilo ĉiam estas aktuala (indikanta postan instrukcion).

La programisto do storas siajn instrukciojn en numere apudajn adresojn tiel, ke la malplej altaj adresoj enhavas la unuajn instrukciojn efektivigotajn, kaj la plej altaj adresoj enhavas la plej postajn. La programisto rajtas malobei tiun paŝpostpaŝan regulon nur tiam, kiam instrukcio en storero estas **saltinstrukcio** al alia storero.

Saltinstrukcio enhavas adreson de instrukcio, kiu estas efektivigota tuj post tiu saltinstrukcio. La tuj postan instrukcion oni rajtas stori en iun ajn storeron, la programita salto indikas ĝian ekzaktan adreson. Dum la efektivigo de la saltinstrukcio la prilaborilo anstataŭigos la enhavon de sia instrukcimontrilo per la adreso indikita de la salto. Tiel la logika daŭro de la programo konserviĝas.

Speciala speco de programsalto okazas, kiam la storita programo vokas subrutinon. En tiu speco de salto oni postulas de la prilaborilo memori enha-

von de la instrukcimontrilo en la momento de la salt-okazo. Tio ebligas al la prilaborilo daŭrigi la efektivigon de la ĉefa programo, kiam ĝi ĝisfine efektivigas la lastan instrukcion de la subrutino.

Subrutino estas programo en programo. Kutime ĝi estas ĝeneralcele instrukcisekvenco, kiu povas esti ripete efektivigata dum la ĉefa programo. Rutinaj programoj, kiuj kalkulas la potencon je du, la sinuson aŭ la logaritmon de programvariablo, estas bonaj ekzemploj de funkcioj ofte skribitaj kiel subrutinoj. Aliaj ekzemploj povas esti programoj konceptitaj por enigi aŭ eligi datumojn de aŭ al apartaj periferiaj aparatoj.

La prilaborilo, laŭ speciala maniero, administras subrutinojn por certigi ordan reiron al la ĉefa programo. Kiam la prilaborilo legis vokinstrukcion, ĝi krementas la instrukcimontrilon (kiel kutime), kaj storas ties enhavon en rezervitan stor-areon nomatan **stako**. La stako tiel savas la adreson de la instrukcio, efektivigota post kompleta efektivigo de la subrutino. Poste la prilaborilo movas la adreson, indikitan en la voko, en sian instrukcimontrilon. La poste legota instrukcio do estos la unua paŝo de la subrutino.

La lasta instrukcio en ĉiuj subrutinoj estas **reiro**. Tia instrukcio ne bezonas indiki adreson. Kiam prilaborilo legas reir-instrukcion, ĝi nur anstataŭigas la nunan enhavon de la instrukcimontrilo per adreso, storita ĉe la stakosupro. Tio ebligas al la prilaborilo, daŭrigi la efektivigon de la vokinta programo ĉe la punkto, kiu tuj sekvas la originan vokinstrukcion.

Subrutinoj ofte estas **ŝtuparaj**; tio signifas, ke subrutino kelkfoje vokas alian, duan subrutinon. Tiu dua povas voki trian kaj tiel plu. Tio estas vere akceptebla, se la prilaborilo posedas sufiĉan kapaciton por stori la necesajn reir-adresojn kaj proviĝis per logiko por tion fari. Alidirate, la maksimuma profundo de la ŝtuparo determiniĝas per la profundo de la stako mem. Se la stako disponas pri loko por stori tri reir-adresojn, do tri niveloj da subrutinoj estas akcepteblaj.

Prilaboriloj diversmaniere administras stakojn. Iuj posedas eblon por storadi reir-adresojn interne de la prilaborilo mem. Aliaj prilaboriloj utiligas rezervitan areon de ekstera storo kiel stakon kaj simple prizorgas **montrilan registrumon**, kiu enhavas la adreson de la plej freŝdata staken-movo. La ekstera stato principe ebligas senliman subrutinŝtuparon. Plie se la prilaborilo disponas pri instrukcioj, kiuj ebligas puŝi aŭ tiri la enhavon de la akumulatoro, aŭ de aliaj ĝeneralcelaj registrumoj, en la stakon aŭ el la stako laŭ la adreso, storita en la stakmontrilo, tiam la prilaboro kun plurnivelaj interrompoj (priskribota en ĉi tiu ĉapitro) estas ebla. La prilaborilan staton (t.s. la enhavojn de ĉiuj registrumoj) oni povas savi en la stakon, kiam interrompo akceptiĝas, kaj poste restarigi ĝin, kiam la interrompo ĝisfine serviĝis. La eblo savi la prilaborilan staton en ĉiu momento estas disponebla, eĉ se la interrompserva programo mem estas interrompata.

1.3. Instrukciregistrumo kaj malkodilo

Ĉiu komputoro havas **vortlongon**, kiu karakterizas tiun maŝinon. Komputoro- vortlongon oni kutime determinas per la amplekso de ĝiaj internaj storeroj kaj interkonektaj kanaloj (nomataj **buso**). Ekzemple komputoro, kies registrumoj kaj busoj kapablas stori kaj transmovi ok bitojn da informo, havas karakterizan vortlongon de ok bitoj kaj nomiĝas okbita paralela prilaborilo. La okbita paralela prilaborilo ĝenerale plej efikas, utiligante okbitajn duumajn kampojn, kaj la storo asociita al tia prilaborilo estas organizita por stori ok bitojn en ĉiun adreseblan storeron. Datumoj kaj instrukcioj estas storataj kiel okbitaj duumaj nombroj aŭ kiel nombroj, kiuj estas entjeraj obloj de ok bitoj: 16 bitoj, 24 bitoj k.t.p. Tiu karakteriza okbita kampo estas ofte nomata okbito.

Ĉiu operacio, kiun prilaborilo kapablas efektivigi, estas identigita kiel unika okbito de datumo, konata kiel **instrukcikodo** aŭ **operacikodo**. Okbita vorto, uzata kiel instrukcikodo, permesas distingon inter 256 eblaj agoj, kio estas pli ol sufiĉa por la plimulto de la prilaboriloj.

La prilaborilo legas instrukcion laŭ du apartaj operacioj. Unue la prilaborilo transmovas la adreson el sia instrukcimontrilo al la storo, due la storo resendas la adresitan okbiton al la prilaborilo. CPU storas tiun instrukciokbiton en registrumon, nomatan la **instrukciregistrumo** kaj uzas ĝin por regi la agojn dum la resto de la instrukcia efektivigo.

La meĥanismo, laŭ kiu la prilaborilo tradukas instrukcikodon en specifajn agojn, postulas pli detalan priskribon, ol permesas la ĉi tie disponebla loko. Tamen la koncepto devus esti intuicie klara al ĉiu logikplanisto. La okbitojn, storitajn en la instrukciregistrumon, oni povas malkodi kaj utiligi por selekte aktivigi unu el pluraj eliglineoj, en tiu okazo el ĝis 256 lineoj. Ĉiu lineo prezentas aron de agoj, asociitaj al efektivigo de unu aparta instrukcikodo. La aktivan lineon oni povas kombini kun selektitaj tempantaj pulsoj por estigi elektrajn signalojn, kiuj do povas utili por iniciati specifajn agojn. La tradukon de kodo en agon realigas la instrukci-malkodilo kaj la asociita regcirkvitaro.

La okbita instrukcikodo ofte sufiĉas por specifi apartan prilaboran agon. Tamen kelkfoje la efektivigo de instrukcio postulas pli da informo, ol okbitoj povas enteni.

Ekzemplo de tio estas instrukcio, kiu adresas storeron. La baza instrukcikodo identigas la efektivigotan operacion, sed ne kapablas specifi ankaŭ la celadreson. En tia okazo estas necesa du- aŭ tri-okbita instrukcio. Sinsekvaj instrukci-okbitoj estas storitaj en sinsekvajn storerojn kaj la prilaborilo **efektivigas du aŭ tri** sinsekvajn legojn por havi la tutan instrukcion. La unuan okbiton, prenitan el la storo, oni lokas en la prilaborilan instrukciregistrumon kaj la postaj okbitoj eniras portempen storon; poste la prilaborilo daŭrigas la efektivigan fazon. Okaze de tia instrukckio oni parolas pri variablo-longo.

1.4. Adresregistrumo(j)

CPU povas utiligi registrumon aŭ registrumparon por enteni adreson de storero, kiun oni adresos. Se la adresregistrumo estas **programebla** (t.e., se ekzistas instrukcioj por ebligi al programisto modifi la enhavon de la registrumo), la programo povas konsistigi adreson en la adresregistrumon antaŭ ol efektivigi **storcelantan** instrukcion (instrukcio, kiu legas datumon el la storo, skribas datumon en la storon, aŭ operacias pri storita datumo).

1.5. Aritmetika/logika unuo (ALU)

Ĉiuj prilaboriloj enhavas artimetikan/logikan unuon, kiun oni ofte nomas nur ALU. ALU, kiel implicas ĝia nomo, estas parto de CPU kaj la ilo, kiu efektivigas aritmetikajn kaj logikajn operaciojn pri duumaj datumoj.

ALU devas enhavi **adiciilon**, kiu kapablas kombini la enhavojn de du registrumoj laŭ la logiko de la dubaza aritmetiko.

Tio permesas al la prilaborilo efektivigi aritmetikajn manipuladojn pri datumoj, kiujn ĝi prenas el la storo kaj el siaj aliaj enirejoj.

Utiligante nur la bazan adiciilon, sperta programisto kapablas skribi programojn, kiuj subtrahos, multiplikos kaj dividos, donante al la maŝino kompletajn aritmetikajn kapablojn. Tamen, praktike pli multaj ALUoj provizas aliajn enigitajn funkciojn, inklude peraparatan subtrahon, *Boole*-logikajn operaciojn kaj paŝigokapablojn.

ALU enhavas **flagbitojn**, kiuj spegulas iujn eventojn aŭ apartaĵojn, okazantajn en aritmetikaj kaj logikaj manipuladoj. Tial flagoj inkludas **kromon, nulon, signon** kaj **parecon.** Eblas programi saltojn, kiujn kondiĉos la stato de unu aŭ pluraj flagoj. Tiel ekzemple, la programo povas esti planita por salti al speciala rutina programo, se la krombito staras post adiciinstrukcio.

1.6. Regcirkvitaro

La regcirkvitaro estas la ĉefa funkciunuo en CPU. Uzante horloĝajn signalojn, la regvirkvitaro prizorgas la taŭgan sinsekvon de la eventoj, postulataj de ĉiu prilabora tasko. Leginte kaj malkodinte instrukcion, la regcirkvitaro eligas la adekvatajn signalojn (al unuoj de CPU aŭ internaj aŭ eksteraj por iniciati la taŭgan prilaboran agon. La regvirkvitaro ofte kapablas respondi al eksteraj signaloj, kiaj estas interrompo aŭ atendopeto. **Interrompopeto** estigas portempan ĉeson de la efektivigo de la ĉefa programo fare de la regcirkvitaro, salton al speciala rutina programo por servi la interrompitan aparaton, kaj poste reiron al la ĉefa programo. **Atendopeto** ofte devenas de stora aŭ eniga/eliga elemento, kiu operacias malpli rapide ol CPU. La regcirkvitaro atendigos CPUon ĝis kiam la storo aŭ la eniga/eliga pordo estos preta pri la datumo.

2. Komputoraj operacioj

Iuj operacioj estas bazaj por multaj komputoroj. Klara kompreno de tiuj bazaj operacioj estas necesa antaŭ ekzameno de la specifaj operacioj de aparta komputoro.

2.1. Tempado

La agadoj de komputoro estas ciklecaj. La prilaborilo legas instrukcion, efektivigas la postulatajn operaciojn, legas la postan instrukcion kaj tiel plu. Tiu orda sinsekvo de eventoj postulas precizan tempadon kaj CPU do bezonas libermovan oscilan horloĝon, kiu provizas referencon por ĉiuj prilaborilaj agoj. La duaĵo: lego kaj efektivigo de nur unu instrukcio estas nomata **instrukciciklo**. La parto de ciklo, asociita al klare difinita ago, estas nomata **stadio**. Kaj la intervalon inter pulsoj de tempada oscililo oni nomas **horloĝ-**

periodo. Ĝenerale unu aŭ pluraj horloĝperiodoj estas necesaj por la efektivigo de stadio kaj pluraj stadioj estas en unu ciklo.

2.2. Instrukcilego

La unua(j) stadio(j) de ĉiu instrukciciklo estas uzata(j) por legi la postan instrukcion. CPU eligas legsignalon kaj la enhavo de la instrukcimontrilo estas sendata al la storo, kiu respondas resendante la postan instrukcivorton. La unua okbito de la instrukcio eniras la instrukciregistrumon. Se la instrukcio konsistas el pli ol unu okbito, pliaj stadioj estas necesaj por havi ĉiujn okbitojn de la instrukcio. Kiam la tuta instrukcio estas en CPU, la instrukcimontrilon oni krementas (preparo por la posta instrukcilego) kaj oni malkodas la instrukcion. La operacio indikata de la instrukcio estas efektivigota dum la restaj stadioj de la instrukciciklo. La instrukcio povas postuli storlegon aŭ -skribon, enigon aŭ eligon kaj/aŭ internan CPU-operacion (ekz. interregistruma movo aŭ registrum-adicia operacio).

2.3 Storlego

Instrukcilego estas nur speciala storlega operacio, kiu movas la instrukcion en la CPUan instrukciregistrumon. La legita instrukcio tiam povas postuli datumlegon el la storo al CPU. CPU denove eligas legsignalon kaj sendas la ĝustan storadreson, la storo respondas, resendante la petitan vorton. La ricevita datumo eniras la akumulatoron aŭ unu el la aliaj ĝeneralcelaj registrumoj (ne la instrukciregistrumon).

2.4. Storskribo

La storskriba operacio similas la storlegan, escepte pri la direkto de la datumomovo. CPU eligas skribsignalon, sendas la ĝustan storadreson, kaj tiam sendas la datumvorton skribotan en la adresitan storeron.

2.5. Atendo (storsinĥronigo)

Kiel antaŭdirite, la agoj de la prilaborilo estas tempataj de mastra horloĝoscililo. La horloĝperiodo determinas la tempadon de ĉiuj prilaboraj agoj. Tamen la rapido de la prilaborila ciklo limiĝas pro la stora legotempo. Post

la sendo de la leg-adreso al la storo fare de la prilaborilo, ĝi devas atendi ĝis la respondo de la storo. Pli multaj storoj kapablas respondi multe pli rapide ol la laborciklo daŭras. Tamen kelkaj ne kapablas doni la adresitan okbiton antaŭ la minimuma tempo, indikata de la prilaborila horloĝo.

Prilaborilo do devus enhavi sinĥronigilon, kiu ebligus al la storo peti **atendostadion**. Kiam la storo ricevas validigitan leg- aŭ skribsignalon, ĝi metas petsignalon al la prilaborila enirejo PRETA, estigante provizoran paŭzon de CPU. Post la tempo necesa por respondi, la storo liberigas la prilaborilan enirejon PRETA kaj la instrukciciklo redaŭras.

2.6. Enigoj/Eligoj

Enigaj kaj eligaj operacioj similas al la storlegaj aŭ storskribaj operacioj, sed en tia okazo, periferia eniga/eliga aparato estas adresata anstataŭ storero. CPU eligas la taŭgan enigan aŭ eligan regsignalon, sendas la ĝustan aparatadreson kaj ricevas la eniran datumon, aŭ sendas la eliran.

Datumo povas eniri aŭ eliri laŭ paralela aŭ seria formo. Ĉiu datumo en karaktra komputoro estas prezentata laŭ duume kodita formo. Duuma datumvorto konsistas el bitaro, ĉiu bito estas aŭ unu aŭ nulo. **Paralela enigo/eligo** estas movo de ĉiuj vortbitoj samtempe, po unu bito laŭ unu drato. **Seria enigo/eligo** estas movo de unu bito post la alia laŭ nur unu drato. Kompreneble, la seria enigo/eligo estas multe malpli rapida, sed postulas ege malpli da materialo ol la paralela enigo/eligo.

2.7. Interrompoj

Interrompaj kapabloj ekzistas en multaj centraj prilaboriloj kiel rimedoj por plibonigi la prilaborilan efikon. Konsideru la okazon de komputoro, kiu prilaboras grandan kvanton da datumoj, kies partoj devos eliri al presilo. CPU kapablas eligi datuman okbiton en nur unu maŝinciklo, sed la presilo bezonas multajn maŝinciklojn por presi la karaktron, specifatan de la datuma okbito. CPU povus atendi, farante nenion, ĝis kiam la presilo estos preta akcepti la sekvantan datuman okbiton. Se en la komputoro estas disponebla la interrompa kapablo, CPU povas eligi okbiton kaj poste daŭrigi la datumprilaboron. Kiam la presilo estos preta akcepti la sekvantan okbiton, ĝi povus peti interrompon. Kiam CPU kvitancas la interrompon, ĝi haltigas la

efektivigon de la ĉefa programo kaj aŭtomate aktivigas la subrutinon, kiu elirigos la sekvantan okbiton. Post la okbita elirigo, CPU daŭrigas la efektivigon de la ĉefa programo. Notu, ke tio principe similas al subrutina voko, sed la salton oni iniciatas el ekstere, anstataŭ el la programo.

Ankaŭ pli kompleksaj interromp-strukturoj estas eblaj. En ili pluraj interrompaj aparatoj estas ligitaj al la sama prilaborilo, sed havas malsamajn prioritatajn nivelojn. Interrompebla prilaborado estas grava kapablo, kiu permesas maksimuman utilon de la aliaj prilaborilaj kapabloj por altgrada datumfluo en la sistemo.

2.8. Suspendo

Alia grava apartaĵo, kiu pligrandigas la datumfluon de prilaborilo, estas la **suspendo**. La suspendivo ebligas operaciojn laŭ rekta storatingo *(DMA)*.

En simplaj enigaj kaj eligaj operacioj, la prilaborilo mem regas la tutan datum-movon. La informo lokota en la storon estas movata de la eniga aparato al la prilaborilo kaj poste de la prilaborilo al la indikita storero. Same la informo, kiu iras de la storo al eliga aparato, iras tra la prilaborilo.

Tamen kelkaj periferiaj aparatoj kapablas movi informon al aŭ el la storo multe pli rapide, ol la prilaborilo mem kapablas fari. Se sufiĉe granda kvanto da datumoj devas esti movata al aŭ el tia aparato, tiam la datumfluo tra la sistemo pligrandiĝos, se la aparato mem povas efektivigi la movon. La prilaborilo devas provizore suspendi sian operaciadon dum tia movo por eviti konfliktojn, kiuj povus okazi, se la prilaborilo kaj la periferia aparato provus adresi la storon samtempe. Tial en kelkaj prilaboriloj estas disponebla la suspendivo.

3. Instrukciaro

Komputoro, eĉ se teĥnike altnivela, kapablas fari nur tion, kion oni ordonas al ĝi. Oni ordonas al komputoro per aro da koditaj instrukcioj nomata **programo**. La agokampo de la programisto estas nomata **programaro** (*En: software,* Fr: *logiciel*), opone al la **aparataro**, kiu konsistas el la reala komputora ekipaĵo. La komputora programaro konsistas el ĉiuj programoj skribitaj por tiu komputoro.

Kiam oni konceptas komputoron, la inĝenieroj kapabligas la centran prilaboran unuon (CPU) efektivigi apartan operaciaron. Oni planas CPUon tiel, ke specifa operacio efektiviĝas, kiam la CPUa reglogiko analizas apartan instrukcion. Konsekvence la operacio, kiun CPU povas efektivigi, difinas la komputoran **instrukciaron.**

Ĉiu komputora instrukcio ebligas al la programisto iniciati efektivigon de iu specifa operacio. Ĉiuj komputoroj enhavas iujn artimetikajn operaciojn en sia instrukciaro, ekz. instrukcion por adicii la enhavojn de du registrumoj. Ofte la instrukciaro inkludas la logikajn operaciojn (t.e. AŬi la enhavojn de du registrumoj) kaj registrum-operaciajn instrukciojn (t.e. krementi registrumon). Komputora instrukciaro enhavas ankaŭ instrukciojn, kiuj movas datumojn inter registrumoj, inter registrumo kaj storo, kaj inter registrumo kaj eniga/eliga aparato. Multaj instrukciaroj provizas ankaŭ **laŭkondiĉajn instrukciojn**. Laŭkondiĉa instrukcio specifas operacion efektivigotan nur, se iuj kondiĉoj estas plenumitaj; ekzemple, salto al aparta instrukcio, se la rezulto de la lasta operacio estas nulo. Laŭkondiĉaj instrukcioj provizas programon per decidiĝa kapablo.

La programisto, logike organizanta instrukcisekvencon laŭ kohera programo, kapablas ordoni al komputoro efektivigi tre specialan kaj utilan funkcion.

Tamen komputoro kapablas efektivigi nur programojn, kies instrukcioj estas laŭ duume kodita formo (t.e. vico de 1 kaj de 0), kiun oni nomas **maŝinkodo**. Ĉar estus treege malfacile programi en maŝinkodo, oni ellaboris programlingvojn. Ekzistas programoj, kiuj konvertas ilin en maŝinkodon, kiun kapablas interpreti la prilaborilo.

Asembla lingvo estas unu el la tipoj de programlingvoj. Unika asembla mnemoniko atribuiĝis al ĉiu el la komputaj instrukcioj. La programisto povas skribi programon (nomatan **fontprogramo**), utiligante mnemonikon kaj iujn perandojn; la fontprogramon oni poste konvertas en maŝininstrukciojn (nomatajn **celprogramo**). Ĉiun asemblan instrukcion oni konvertas al po unu maŝinkoda instrukcio (1 aŭ pluraj okbitoj) per asemblero. La asemblaj lingvoj kutime dependas de la maŝino (ili povas utili nur en unu tipo de komputoro).

La *8080*-a instrukciaro inkludas kvin malsamajn tipojn de instrukcioj:

— **Datum-mova grupo** — movas datumon inter registrumoj aŭ inter la storo kaj registrumo.

— **Aritmetika grupo** — adicias, subtrahas, krementas aŭ malkrementas datumon en registrumoj aŭ en la storo.

— **Logika grupo** — kaj, aŭ, eskluda aŭ, komparas, ringpaŝigas aŭ komplementas datumon en registrumoj aŭ en la storo.
— **Salta grupo** — laŭkondiĉaj kaj senkondiĉaj salt-instrukcioj, subrutinvokaj instrukcioj kaj reiraj instrukcioj.
— **Staka, eniga/eliga kaj maŝinrega grupo** — inkludas enigajn/eligajn instrukciojn, same kiel instrukciojn por utiligi la stakon kaj la internajn regflagojn.

3.1. Instrukciaj kaj datumaj formatoj

La storo de la *8080* organiziĝas laŭ okbitaj kvantoj nomataj okbitoj. Ĉiu okbito posedas unikan 16-bitan duuman adreson, kiu rilatas al ĝia laŭvica pozicio en la storo.

La *8080* kapablas rekte adresi ĝis 65 536 okbitojn de storo, kiu povas konsisti el nurlegebla storo (*Romo*) kaj el legebla modifebla storo (*RAM*).

En la *8080* oni storas datumon laŭ la formo de okbita duuma entjero.

Kiam registrumo aŭ datumvorto enhavas dubazan numeron, estas necese difini la ordon, laŭ kiu la bitoj de la numero skribiĝas. En *INTEL 8080* la biton 0 oni konsideras kiel la **malplej signifan biton** (MSB) kaj la biton 7 kiel la **plej signifan biton** (PSB).

La *8080*-aj program-instrukcioj povas longi unu, du aŭ tri okbitojn. Plurokbitaj instrukcioj devas esti storataj en sinsekvajn storerojn; la adreso de la unua okbito estas ĉiam uzata kiel la adreso de la instrukcio. La ĝusta instrukciformato dependas de la aparta farota operacio.

3.2. Adresaj manieroj

Ofte la datumo, koncernata de la instrukcio, estas storita en la storo. Kiam estas uzata plurokbita numera datumo, la datumo, same kiel la instrukcioj, estas storita en sinsekvaj storeroj, kun la malplej signifa okbito unue, sekvata de pli kaj pli signifaj okbitoj. La *8080* kapablas adresi datumon, storitan en la storo aŭ en registrumoj laŭ kvar malsamaj manieroj:
— **Rekta** — la okbitoj 2 kaj 3 de la instrukcio enhavas la ekzaktan storadreson de la datumo (la malplej signifaj bitoj de la adreso estas en la okbito 2, la plej signifaj bitoj estas en la okbito 3).
— **Registruma** — la instrukcio indikas la registrumon, kie troviĝas la datumo.

— **Traregistruma** — la instrukcio indikas registrum-paron, kiu enhavas la storadreson, kie troviĝas la datumo (la plej signifaj bitoj de la adreso estas en la unua registrumo de la paro, la malplej signifaj bitoj en la dua).
— **Tuja** — la instrukcio mem enhavas la datumon. Tio estas aŭ 8-bita kvanto aŭ 16-bita kvanto (la malpli signifa okbito estas la unua, la pli signifa okbito la dua).

La efektivigo de la instrukcioj progresas laŭ sinsekve plialtiĝantaj storeroj, escepte de la okazo, kiam la efektivigo estas direktata per interrompa aŭ salta instrukcio. Saltinstrukcio povas indiki la adreson de la tuj poste efektivigota instrukcio laŭ du manieroj:
— **Rekta** — la saltinstrukcio mem enhavas la adreson de la tuj poste efektivigota instrukcio. (Escepte de la instrukcio *RST*, la okbito 2 enhavas la malpli signifan adresparton kaj la okbito 3 la pli signifan adresparton).
— **Traregistruma** — la saltinstrukcio indikas registrumparon, kiu enhavas la adreson de la tuj poste efektivigota instrukcio. (La plej signifaj adresbitoj estas en la unua registrumo de la paro, la malplej signifaj bitoj en la dua).

La instrukcio *RST* estas speciala unuokbita vokinstrukcio (kutime uzata en interrompaj sekvencoj). *RST* inkludas 3-bitan kampon; la programregon ricevas tiu instrukcio, kies adreso valoras 8-oble la enhavon de la 3-bita kampo.

3.3. Kondiĉaj flagoj

En la *8080* estas kvin kondiĉaj flagoj, asociitaj al la efektiviĝo de instrukcio. Ili estas nulo, signo, pareco, kromo kaj mezkromo. Ĉiu estas reprezentata per aparta unubita registrumo en CPU. Flagon oni starigas, donante al la bito la valoron 1; flagon oni kuŝigas, donante al la bito la valoron 0.

Escepte de okazoj, kiam estas alie indikite, instrukcio tuŝas flagon jene:

Nulo: Se la rezulto de instrukcio valoras 0, ĝi starigas la flagon, alie ĝi kuŝigas ĝin.

Signo: Se la plej signifa bito de operacirezulto valoras 1, la flago staras, alie ĝi post la operacio kuŝas.

Pareco: Se la 2-modela sumo de la unu-valorantaj bitoj el la operacirezulto valoras 0 (t.e., se la rezulto estas para) la flago staras, alie ĝi kuŝas (t.e., se la rezulto estas nepara).

Kromo: Se la instrukcio estigas superfluon (de adicio) aŭ subfluon (de

subtraho aŭ komparo) ekster la plej signifa bito, la flago staras, alie ĝi kuŝas.

Mezkromo: Se la instrukcio kaŭzas superfluon ekster la bito 3 al la bito 4 en la rezulto, la mezkromo staras, alie ĝi kuŝas. Tiun flagon tuŝas adicioj en normala precizo, subtrahoj, krementoj, malkrementoj, komparoj kaj logikaj operacioj. Ĝi estas uzata precipe kun adicioj aŭ krementoj, kiuj antaŭas instrukcion *DAA* (dekbaza aligo de la akumulatoro).

3.4. Simboloj kaj mallongigoj

La sekvantaj simboloj kaj mallongigoj estas uzataj en la posta priskribo de la *8080*-instrukcioj.

Simboloj	**Signifoj**
akumulatoro	Registrumo A.
adr	16-bita adresa kvanto.
datumo	8-bita datuma kvanto.
d 16	16-bita datuma kvanto.
okbito 2	La dua okbito de la instrukcio (aŭ okb 2).
okbito 3	La tria okbito de la instrukcio (aŭ okb 3)
pordo	8-bita adreso de eniga/eliga aparato
r, rl, r2	Unu el lă registrumoj A,B,C,D,E,H,L.
CCC, FFF	La 3-bita nombro, indikanta unu el la registrumoj A,B,C,D,E,H,L (CCC = celo; FFF = fonto):

CCC aŭ FFF	**Registruma nomo**
111	A
000	B
001	C
010	D
011	E
100	H
101	L

rp — Unu el la registrumparoj:

B — reprezentas la paron B-C kun B kiel la pli signifa registrumo kaj C kiel la malpli signifa registrumo.

D — reprezentas la paron D-E kun D kiel la pli signifa registrumo kaj E kiel la malpli signifa registrumo.

H — reprezentas la paron H-L kun H kiel la pli signifa registrumo kaj L kiel la malpli signifa registrumo.

SP — reprezentas la 16-bitan stakmontran registrumon.

RP — La 2-bita nombro, indikanta unu el la registrumparoj B,D,H,SP:

RP	**Registrumparo**
00	B-C
01	D-E
10	H-L
11	SP

rs	La unua (pli signifa) registrumo el la indikita registrumparo.
rm	La dua (malpli signifa) registrumo el la indikita registrumparo.
PC	16-bita instrukcimontra registrumo (PCS kaj PCM estas uzataj por respektive indiki la pli signifan kaj la malpli signifan okbitojn).
SP	16-bita stakmontra registrumo (SPS kaj SPM estas uzataj por respektive indiki la pli signifan kaj la malpli signifan okbitojn).
ri	Bito "i" de la registrumo "r" (la bitoj numeratas de 7 ĝis 0 de maldekstre dekstren).
Z,S,P,C-Y,AC	La kondiĉaj flagoj: Z = nulo, S = signo, P = pareco, CY = kromo, AC = mezkromo.
( )	La enhavo de la storero aŭ registrumo meze de la krampoj.
←	"estas movata al" (dekstra parto maldekstren).
∧	Logika "KAJ"
⊻	Eskluda "AŬ"
∨	Inkluda "AŬ"
+	Adicio
×	Multipliko
↔	"estas interŝanĝata kun"
—	La unuuma komplemento [t.e. ($\bar{A}$)]
n	La restarta numero 0 ĝis 7
NNN.	La dubaza reprezento 000 ĝis 111 de la restarta numero 0 ĝis 7 respektive
M	La storo

4. Priskribo de la instrukcioj

4.1. Datum-mova grupo

Tiu instrukcigrupo movas datumon aŭ al aŭ el registrumo kaj storo. La kondiĉaj flagoj ne estas tuŝataj de ĉiuj instrukcioj de tiu grupo (tab. 1).

Tab. 1

